

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono Kč 20.—, eksterlande Kč 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kč 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. — Gvidas redakcia konsilantaro. — Redakcio: Plzeň, Houškova ul. 32. — Administranto: Frant. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso ĉs. n-ro 5203, aŭstria n-ro 169.352. — Telefono: 732/VI. — La manuskriptojn oni ne resendadas.

I. G.

RUSA KATASTROFO.

Malĝojaj raportoj alvenas ĉiutage el Rusujo. Ekregis tie terura malsato — pro malsato miloj da homoj mortas kaj miloj da aliaj freneziĝas. Ĉiutage alvenas el Rusujo alvokoj kaj petoj pri helpo. Rusaj gazetoj skribas pri malsato, ke ĝi estas pli terura ol milito, ĉar ĝi mortigas homojn malrapide, sed certe.

Ĉiu brutaro estas jam formanĝita. Krusto de arboj estas serĉata manĝaĵo de multaj familioj. Loĝantaro en multaj regionoj nutras sin per pajlo, kiun oni forprenas de tegmentoj. Oni tie ankaŭ manĝas platkukojn, kiuj estas bakitaj el ĉevala sterko, se ia ankoraŭ estas. Malsato estas tiel granda, ke oni tie manĝas infanojn, kiujn oni forŝtelas al najbaro kaj mortigas. Okazis ankaŭ faktoj, ke formanĝitaj estis mortintoj. Tutaj vilaĝoj estas forlasitaj de kamparanoj, kiuj forkuras en aliajn regionojn. Ie oni trovas maljunulon, kiu jam ne povis antaŭ malsato forkuri, alie infanon, kiun gepatroj forlasis. Tiu maljunulo aŭ tiu infano ne estas jam similaj al vivanta estaĵo. Ili similas al skeletoj, kiuj revivigis. Malsato devigas patrinojn mortigi la infanojn, ĉar ili ne povas rigardi, kiel infanoj suferas. Sur ŝoseoj kuŝas amasoj da kadavroj.

Terure estas pensi pri sorto de kompatindaj Rusoj. — Ĉu povas nia konscienco esti trankvila? Ĉu ni povas tion pacience toleri? Ne, tute ne, ĉar ni estas homoj kaj ili estas niaj fratoj — ni estas anoj de unu homa familio. Sufero de Rusoj estas nia malĝojo kaj ĝi disŝiras nian konsciencon. Se membro de nia familio malsatus aŭ

suferus, ni certe ne povus tion rigardi, ĉar li estas nia frato. Kaj tiuj suferantoj en Rusujo, ĉu ili ne estas niaj fratoj? Ĉu ni ne volas al ili helpi?

En Rusujo multaj homoj kaj multaj infanoj mortas, ne havante sufiĉe da nutraĵoj. Kaj inter tiuj homoj certe troviĝas ankaŭ esperantistoj kaj inter tiuj infanoj certe estas tiuj, kiuj iam fariĝos esperantistoj, se ili estos savitaj de morto. Tie, en Rusujo, estas multaj, kiuj alportus al nia movado novajn fortojn.

Ni, esperantistoj, estas la unuaj, al kiuj apartenas helpi al niaj rusaj fratoj. Ni, esperantistoj, devas montri, ke nia celo ne bazas nur en entuziasmo, ke ni ne volas atingi nian celon nur per vortoj kaj per diversaj devizoj, sed ni montru nian fratecon, por kiu ni batalas, ni pruvu per faktoj, ke nia laboro kaj nia celo estas noblaj. Per tio ni montrus al mondo, ke sorto de homoj — de niaj fratoj, ne estas al ni egala. Ĉar ni kolektiĝis sub verda standardo — sub tiu bela signo de homamo, de espero, sub tiu signo, kiu diskonigas amon inter homaro, pro tio estas nia devo helpi al tiu, kiu suferas, kiu nian helpon bezonas.

En tiu lando, kie staris lulilo de nia lingvo — kie aperis unuaj batalantoj por nia afero, tie nun regas malsato kaj . . . morto.

Ni ne prokrastu nian subtenon, ĉar malsato regas terure kaj niaj rusaj fratoj atendas helpon — ili atendas niajn agojn. Niaj konscienco kaj humaneco ordonas al ni, helpi al kompatinduloj.

T. G. MASARYK

prezidanto de Ĉeĥoslovaka respubliko, atingis la 7-an de tiu ĉi monato 72-an jaron de sia laborplena vivo. Pasintan jaron li grave malsaniĝis kaj ni timis pri nia »paĉjo«, sed li venkis malsanon kaj, refreŝiĝinte per kelkmonata restado en Italio sur insulo Capri, denove komencis intensivaj labori por bono de ĉiuj loĝantoj en nia ŝtato. Pro tio estas nia plej sincera dezirego, ke la amata prezidanto vivu ankoraŭ multajn jarojn, por ke li povu plenumi ĉiujn siajn humanajn ideojn.



RIEDL L.:

ESPERANTO TRIUMFANTA

(Mia respondo post duono de l' jaro al skeptika rido de multaj.)

Jes, estis la fakto, ke antaŭ ses monatoj nia urbo sciis pri Esperanto nur tion, ke ĝi ekzistas. En Nova Paka estis krom mi du aŭ, ŝajnas al mi, tri esperantistoj, kiuj preskaŭ nenion sciis pri nia movado kaj kiuj nur silentis. Ili timis ion fari, ili timis fondi ĉi tie grupon, ĉar multaj homoj nur ridis, kiam ili elparolis vorton »Esperanto«. »Rusan, anglan kaj francan kurson ni bezonas,« diris multaj, »sed esperantan kurson? — ĝi estas tute superflua!« Kaj niaj samideanoj silentis denove. Mi estis lernanto de sro. profesoro Lukáš, kiun mi imitis, kaj kiu donis al mi multajn tre valorajn konsilojn. Post lia forveturo mi gvidis en Jilemnice »Rondeton« kaj gimnazian kurson kaj mi jam tiam intencis fondi klubon en N. Paka. Kaj post XIIIa kongreso, kiam la ĵurnaloj estis plenaj da artikoloj pri Esperanto, mi definitive decidigis: nun aŭ neniam. — Verdaj afiŝoj anoncis komencan de l' instruado. »Esperanto?! — sensencaĵo« tiel oni parolis pri ĝi. Kun 40 gejunuloj mi komencis. Sinjoro direktoro permesis la instruadon en reala lernejo. Ni estis plenaj da entuziasmo, sed baldaŭ ĉirkaŭ ni estis fortaj, ŝajne neforigeblaj baroj. Sed miaj gejunuloj min subtenis en la baboro, kaj kiam mi post du monatoj forverturis en Praha, en nia urbo ekzistis jam »Rondeto«. De tempo al tempo mi ricevus komunikojn, ke samideanoj laboras. En unua tempo instruis Esperanton fino Říhová, kaj poste energia kaj oferema sro prezidanto Kovář. Ili legas »La Progeson«, esperantajn librojn, ili korespondas kun tuta mondo kaj en tri elmontraj ŝrankoj ili ekspozicias esperantaĵojn. Nuntempe »La Progreso« estas en urba legejo kaj vigla samideano sro Věchet

donas ĝin en kafejon. La propagando estis tiel efika, ke dum Kristnasko la klaso, en kiu mi instruis, estis denove plena.

Post ses monatoj estas en N. Paka preskaŭ 100 geesperantistoj. En junio mi silentis al skeptika rido de multaj — hodiaŭ mi metas antaŭ skeptikuloj tiun ĉi statistikon — kaj se vi volas detalojn, mi estas, ĉiam preta doni ilin al vi. Mi estas konvinkita, ke »nia diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝos! . . .«

ooo

B. BEČVÁŘOVÁ:

SENKOMPATA . . .

(Fino.)

Venis aŭtuno. La dekunua aŭ jam dekdua, de tiu tempo, kiam la fiŝgardistino estis vizitinta sian filon en Vieno. Estis vespero. La okcidento kvazaŭ brulus per lumo de torĉoj kaj sur la blataj ebenaĵoj aperadis nebuloj. Venos ventega vetero, aŭ povas ankaŭ plui. La montaro de Šumava kaŝis sin post la nuboj. La suno estis subiranta en la akvon. La fiŝgardistino venis en la kabanon.

Sur la strato, de la stacidomo kondukanta, malrapide iris vagisto. Li estis homo ne maljuna, sed videble treege malmoraliginta. La vizaĝo, precipe la nazo estis plena da abomena ekzantemo. Oni povis vidi, ke li bone konas ĉi tiun regionon. La strato de l' stacidomo inter la defaliĝintaj, altkreskintaj arboj serpentiĝis al la alta ebenaĵo, ĉirkaŭante la ĉaskastelon, kaj nun de tie kondukis al la urbeto, al la restadeja princa kastelo sur la monto. El la lagoj kaj lagetoj elstaris nebulo kaj la domtegmentojn en la urbeto oni ne povis plu rekoni. Sole la kastelo, belega, fabela kastelo majeste altiĝis super la nuboj kiel insulo. Ĝiaj fenestroj ekflamis per sulfurkolora flavaĵo.

La vagisto ne iris en la urbon. Li iris malsupren sur la kamplimo al la ĉaskastelo, ĉirkaŭiris la konstruaĵon, akompanata de furiozega hunda bojado, kaj post la fazanejo sur la laga digo ĉe la kabanon de fiŝgardisto Vjeĥet li haltiĝis. La maljuna hundo montris al la vagisto la dentojn. Sed la alveninto admonekkriis kaj la hundo kuntiriĝis. Malrapide, kvazaŭ ŝtelire ĝi alproksimiĝis al la nekonatulo, ĉirkaŭflartis lin kaj komencis svingi la voston.

»Ĉu ci konas min?«, ekparolis la vagisto. La hundo komencis ĝoje plorboji. Io, kvazaŭ larmo, ekaperis sur diboĉmalbeliĝinta vizaĝo de la vagisto. Poste li denove nubigis la vizaĝon, kliniĝis la kapon, moment-

on li stariĝis kaj poste li eniris en la kabanon. En la ĉambro, ĉe la pordo li ekstaris, kiel decas al la vagisto. La hundo traglitis post li kaj kuradis de sia estrino al la estro kvazaŭ ĝi volus al ili ion diri, koncize ĝi bojetis. La hundo montris grandan ĝojon. La fiŝgardistino koleris je hundo pro tio. Iam ĝi furioze atakas la entrudulon, estas eĉ necese kriadmoni ĝin, hodiaŭ ĝi akompanis la vagiston kiel bonan kamaradon.

»Kion vi volas de ni, homo?«, ŝi demandis malafable.

»Noktan ripozon«, diris la vagisto.

»Tiun vi ricevos en la urbo, tie estas do la pasloĝejo«, diris la fiŝgardistino.

La vagisto eĉ ne ekmovis sin.

»Nu, kial vi ne iras, homo?«, kun granda miro diris la mastrino.

»Panon!«, ekmuĝis la vagisto.

La fiŝgardistino iris kaj fortranĉis pecon da pano kaj volas ĝin doni al la vagisto. Tiu ne deturnis de ŝi la okulojn. La fiŝgardistino rimarkis tion. Ŝi fiksas sian rigardon en la ruĝan vizaĝon de la vagisto. La manoj kune kun la pano falis malsupren.

»Kio okazis al vi, patrino?«, aŭdiĝis voĉo de patro. La vagisto kovris sian vizaĝon per ambaŭ manoj.

»Paĉjo, panjo, pardonu min!« —

»Jezuo Kristo! Tio estas nia Franĉjo!«, ekkriis la maljunulo. Tiu, je kiu li tiom preĝis, estis reveninta hejmen. La maljunulo elpreĝis lin al si. La ĉiela instanco, kiu havas la devon decidi pri niaj preĝoj, estas iam eksterordinare favora al ni. La maljunulo ekstaris, etendis la manojn kaj ekŝanceliĝis. La maljunulino rekonsciigis. Turnante sin al la patro, ŝi estis pala kiel kreto. Ĉi tio ankoraŭ mankis al ŝi. Ĉu ne sufiĉas tio jam, ke ŝi havas filon vagiston?

La diboĉa vivo alkondukis filon de l'fiŝgardisto al la plena mizero. Li fariĝis krimulo kaj evitindulo de l'homa socio. Oni de ĉie elpelis lin. Li ricevis sian rekompencon.

La fiŝgardistino neniam eĉ ekpensis, ke ŝi povus iam venĝi sin al la filo pro malhumiliĝo, kiun li en Vieno preparis al ŝi. Ŝi atendis nenion plu de l'justeco. Sed nun frostiga rigideco ekregis sian vizaĝon, same kiel al homoj, kiuj malrespektas la sentencon de l'pacienuloj: »La venĝo apartenas al Dio!« — Kial atendi venĝon dian, se ŝi mem sentas sin kvazaŭ ilo de dio, kiu devas ŝin kaj la maljunan edzon venĝi?

Reveninte al la tablo, ŝi kvietigis kaj sidigis la edzon sur la seĝon. Li tremiĝis

kaj singultadis kvazaŭ en febro. Ĉe la pordo kuntiriĝis la vagisto kaj mallaŭte ploris. Li eble suferis, eble ludis komedion, kiu ja povas koni la vagistan animon. La hundo eksidis en la mezo de l'ĉambro kaj kontente ĉirkaŭlekis sin. Ĉi tiuj homoj rekonis sin reciproke; la hundo ekkomprenis tion per sia besta prudento kaj ĝia hunda koro ĝojis pro tio.

La fiŝgardisto rekonsciigis. Li rememoris al si ĉion, kio antaŭe okazis kaj fikse rigardis edzinon per sia petema mieno. Li kunmetis la manojn kaj mute petis pardonon por la erariĝinta filo. La vizaĝo de maljunulino nubiĝis: »Ne petu!« ŝi kriadmonis lin maldelikate.

Ŝi turnis sin al la pordo kaj per malestima rigardo, ŝi mezuris la vagiston de la kapo ĝis la piedoj. Poste ŝi diris:

»Homo, vi eraras. Ni havis iam filon, alt-rangan oficiston. Li estis tiel »granda sinjoro«, ke li hontis pro siaj malriĉaj honestaj gepatroj. Sian patrinon li elpelis, la patron li malestimis. Tian filon ni havis. Sed filon vagiston, ni absolute ne havas.«

En la ĉambro ekregis tomba silento. La fiŝgardistino mallevis la kapon, la vagisto ŝovis sin en la ombbron kaj la maljunulo staris en la ruĝa lumo de l'subiranta sumo. Granda ŝi estis en sia terura malmildec. »Mia estas la venĝo!« kvazaŭ estus skribite sur ŝia sulkiĝinta frunto, al la ĉielo turnita.

La vagisto ĉe la pordo kuraĝis elparoli vortojn:

»Mi estas mizera senhejmulo. Mi malsatas!«

»Iru en la urbon, en la malsanulejon,« estis la respondo.

»Patrino!« li petis ankoraŭ unufojon.

»Mi ne estas via patrino. Ni ne havas filon plu.« estis ŝia lasta vorto.

»Edzino!« ekkriis la fiŝgardisto peteme.

Per sola rigardo ŝi silentigis lin. Ĉio malforta falis teren venkita de tiu terure rezistema maljunulino. La vagisto, al kiu estas do nenio sankta falis antaŭ ŝia grandeco en la polvon. La buŝo mutiĝis. Ŝanceliĝante li eliris el la pordo. La plorado de l'patro, kiu ĉion pardonis al li, akompanis lin.

Sed malbeno patrino estas pli forta, ol la patra benado!

La maljunulo plorsingultis kvazaŭ infano: »Patrino, patrino, kiel vi povas ja preĝi: »Pardonu al ni ŝuldojn niajn?«

»Mi tute ne preĝas. Kial preĝi, por kiu«, aŭdiĝis respondo. Ŝi vere ne sciis por kiu preĝi, ŝi ne sciis ankaŭ por kiu vivi. Ŝia patrino fiereco estis ricevinta satisfakton, ŝi estis ja venĝinta sin, sed ŝi samtempe mortigis sin

mem, ŝia koro droniĝis en sango. Pala kiel fantomo ŝi staris en sangoruĝa lumo de l' malleviĝanta suno. Ŝi aŭskultis ankoraŭ la bruigan paŝadon de l' vagisto, kiu pli kaj pli malfortiĝis. Kaj kiam la bruo ne estis plu aŭdebla, ŝi falis teren, kvazaŭ subbakita arbego, kiu sciis obstine rezisti la ventegojn sed frapegon de l' fulmotondro ĝi rezisti ne povis...

Kiam la maljuna fiŝgardisto revivigis sian edzinon, li estis je sia risko elirinta el la dometo kaj vekis en la kamparon, li revokis sian filon, ke li revenu. En la ĉambro vokis lia edzino skuiĝanta pro febre: »Kie estas Franĉjo...«

La maljuna hundo revenis. Ĝi estis akompaninta la vagiston. Sed lin englutis jam la densa nebularo de la Blata kamparo.

El bohema lingvo tradukis M. K.

○○○

JOSEF ZEMAN:

NOVA SUKCESO EN ĈEĤA VITROINDUSTRIO.

Lastan tempon alportis ĉeĥaj gazetoj sciigojn pri la nova »ne disrompebla« vitro, kiuj memkompreneble vekis grandan intereson ĉe la publiko. La afero koncernas eltrovon de eksterordinara signifo, kies ekspluato kaj disvatigo celos al konsekvencoj, kiujn ni nun povas malfacile imagi.

La eltrovinto Dro. Inĝ-o Václav Horák, direktoro de vitrofabriko de Kavalír en Sázava, donis al mi tutan serion da sciigoj pri tiu — ĉi nova vitro, pri kiuj mi estas konviktita, ke ili interesos nian vastan publikon. Kun modesteco apartenanta nur al homoj de granda spirito li rifuzis preskaŭ da trionojn da meritoj pri tiu-ĉi multsignifa eltrovo kaj li atribuis ilin kiel laboron de tri generacioj de familio Kavalír kaj precipe al Vladimír Kavalír, kiu antaŭ ne longe mortis.

Kaj vere: historio de ĉeĥa ĥemia vitro kaj de vitro antaŭ nelonge eltrovita estas kvazaŭ parence kumigita kun la vitrofabrikoj de Kavalír kaj kun la nomo de ilia lasta direktoro, pro tio estos tre interese ekscii ion pli detalan.

La vitrofabrikoj de Kavalír en Sázava (en Ĉeĥoslovaka respubliko) estas entrepreno fondita antaŭ cent jaroj, kaj ili gajnis per laboro de tri generacioj mondkonatan nomon. Ili estas solaj fabrikoj de ĥemia vitro en Ĉeĥoslovaka respubliko kaj antaŭ la mondmilito ili provizis ankaŭ Anglujon kaj Amerikon.

Kompreneble dum la milito estis fonditaj ankaŭ en tiuj-ĉi ŝtatoj ĥemiaj vitrofabrikoj, sed la vitrofabrikoj de Kavalír povis kun ili bone konkuri. En la okdekaj jaroj, kiam revenis al la patra entrepreno sro. Vladimír Kavalír, viro de nebula koro, fama specialisto en la vitro-industrio kaj ĝia tekniko, moderna laboranto scianta, ke sukceso de la entrepreno bazas en teknika perfektigo de fabrikado kaj en plialtigita fortikeco de fabrikata vitro kontraŭ ĥemaj influoj kaj ŝanĝoj de la varmeo, ricevis tiuj-ĉi vitrofabrikoj modernan bazon. Li estis senlaca en siaj eksperimentoj pri perfektigo de vitro kaj li laboris ankaŭ kun reprezentantoj de ĉeĥa ĥemia scienco, kiuj provis liajn fabrikojn. Kun profesoro Šebor kaj doktoro Veselý li unufoje difinis la fizikajn ecojn de Kavalír-a vitro. Oni entreprenis sennombrajn eksperimentojn rilate fondadon de ne kalkuleblaj vitraj miksaĵoj, oni studis influon de apartaj almiksaĵoj, kombinaĵoj kaj elementoj, kiuj en la vitra-industrio estas uzebaj kaj kiuj kondiĉis precizajn proprecojn de fabrikata vitro.

La mondmilito por longe ĉesigis fabrikadon en ĉiuj vitrofandejoj de Kavalír. Oni aprobis en Vieno la gravecon de ĥemia vitra fabrikado ankaŭ por la militceloj, sed oni malfavoris aŭtentikan ĉeĥan entreprenon. La laboristoj anstataŭis la vitrotubojn per pafiloj kaj filantropia Vladimír Kavalír disdonis sian posedaĵon al la familioj de neokupitaj vitrolaboristoj. Ĉiuj liaj klopodoj, akiri permeson por la vitrofabrikado, estis vanaj pro opozicio de »fakaj militrondoj.«

Poste alvenis ĉeĥa liberiĝo kaj Vladimír Kavalír forĝis ĉiujn suferojn kaj komencis entuziasme kaj energie konstrui la trian fandejon laŭ la plej moderna vitra tekniko. Bedaŭrinde li ne finis sian vivcelon; li, kiu ĝojatendis la ekbruligon de eterna vitrofabrika fajro, mortis kaj kun lia spirito malaperis ankaŭ, ĉiuj spertoj de la longjara laboranto sen konservo por venontaj generacioj.

La malĝoja stato de la forlasita ĥemia vitro-industrio en Sázava ne longe daŭris. nova vivo venis sub la gvidado de Dro. Inĝ-o Václav Hrák, absolvento de ĉeĥa tekniko, pli frue komencinta labori en la fako de koloriga ĥemio. Kiel longjara asistento de alta teknika lernejo li sciis pri ĉiuj vitro-mankoj en la laboratorioj; li ekkonis mankajn de vitro malpli valora kaj preferojn de unusola konkurento de Kavalír, de germana firmo Schott und Genossen en Jenc. Per influo de eksterdinaraĵoj cirkonstancojn li fariĝis direktoro

de entreprenoj en Sázava kaj li daŭrigis en laboroj, kiujn ĉesigis la morto de Vladimír Kavalír. Li daŭrigis la esploradon pri pliperfektigo de vitra kvalito kaj li atingis post longa vico da pli malpli sukcesaj eksperimentoj vitron de admirindaj specifikaj ecoj.

Feliĉe li sukcesis fabriki miksaĵon, kiu rezistas al la fandaĵo. Post la intensa atendo li sukcesis iun matenon je la sesa horo la miksaĵon fandi; sed ne estis eble elblovitan vitron per malvarma akvo forigi de vitrotubo. La maljunaj kaj spertaj vitrolaboristoj ne kredis — ankaŭ la provo, fortranĉi la vitron per normala ŝtono malsukcesis kaj nur per krunda ilo sukcesis ĝin apartigi de la vitrotubo. Laboristoj vane penis normale rompi la vitron kaj la fandeja junularo tuj provas solidecon de la nova vitro kaj uzas rondan kupoleton kiel piedpilkon por footballudo.

Vazoj fabrikataj de tiu-ĉi vitro estis ekspedataj al la fakaj institutoj por eksperimentoj kaj iliaj sciencaj kritikoj atestas praktikajn ekkonojn de la vitro-laboristoj en Sázava.

Oni poste komencis el la nova vitro fabriki ankaŭ aliajn objektojn. La vitro-laboristaro komencas kuraĝe fabriki ankaŭ la kuirvazaron kaj post ne longe ili alportas novan pruvon de granda utileco de tiu-ĉi vitre: vitran bakpaton kaj en ĝi bele bakitan buĥton. La fandejestro ordonas fabriki rustipan samovaron, hejtigata per ligna karbo kaj la sukceson de la nova pruvo oni posttrinkis per teo, kuirita en tiu-ĉi vitra samovaro. Ĉiuj en la fandejo vivas en komprenebla emocio kaj baldaŭ oni eksportas la unuan sendaĵon al ekspozicio en Hradec Králové, kies urbanoj estis unuaj, kiuj gustumis la rost-aĵojn bakitaj en la vitra bakpato.

Poste oni pruvis pluajn multnombrajn sukcesintajn eksperimentojn antaŭ specialistoj de ĉeĥa tekniko kaj poste la eltrovinto turnis sin al esplora sukerfabrika instituto kaj transdonas novan fabrikaĵon al ĝiaj membroj por esplorado. Kia estos rezulto? Malkonfidema estro sro. Staněk subigas la novan vitron al severa eksperimento, al kiu li uzis gasojn, blovtubojn, elektron, fanditajn metalojn k. t. p., ĉion li ŝetas sur novan vitron, severe provas kupoletojn kaj tinetojn, komparas kun la plej bonaj aliaj vitroj kaj fine kun ĝoja miemo li premas la dekstran manon de sia kamarado jam senigita de dubo. La nova fabrikaĵo estas tre bona — kaj de la vitro oni vere jam nenion plu povas deziri.

Kelkaj eksperimentoj estis ripetataj dum la kunveno de mezbohema kaj oriet-

bohema sukerfabrika societo kaj ili pruvis antaŭ la forumo de maljunaj spertaj hemiistoj la bonegajn proprecojn de nova vitro, kiu havas la signon: »Silex Kavalier«. Kun malkonfido alrigardas kunvenantaro kiel oni per maldika kupoletto kun longa gorgo enbatas najlon en lignan subaĵon, kun malkonfido prezidanta direktoro sro Hyross lasas fali la kupoleton el maldika vitro de prezida tribunon — de alteco ne pli malmulte ol du metroj — teren. Tiun-ĉi eksperimenton kun la sama malkonfido ripetas multaj ĉeestantoj, sed la kupoletto rezistas. En la maldika tineto oni fandigas stanon kaj subakvigas ĝin siblanta en malvarman akvon. La metalo en la tineto krakas — la vitro rezistas. Alia tineto per akvo plenigita kaj per mano altenita sen reteto super fajro — la akvo bolas, forfluas, la lasta guto kurkulas sur ĝia ruĝvarmigita fundo, malaperas kaj — la tineto el la vitro »Silex Kavalier« ne rompiĝas.

La kunvenantaro entuziasme aplaŭdas kaj rekonas, ke komencos nova tempo por la laboristoj, kiam forgesema adepto de la hemio povas holvaporigi la fluidaĵon ĝis la lasta guto sen perdo de tineto.

Tiuj-ĉi eksperimentoj pruvas, ke nova vitro havas eminentajn proprecojn (skribi »neromplebeco« estas trograndigo) sed certe ĝi alportos novan gloron al konata nomo de ĉeĥa vitro-industrio en la tuta mondo.

El »Národní Politika« trad. Klema Hlaváčová.

Mi petas esperantistojn de ĉiuj landoj, ke ili afable traduku tiun-ĉi artikolon en sian nacian lingvon kaj publikigu ĝin en gazetoj: La gazetojn en kiuj estos publikigita tiu-ĉi artikolo pri nova vitro bonvolu sendi al la tradukantino laŭ adreso (Kl. Hlaváčová, instruistino, Praha-Smíchov, Jungmannova ul. 6. Ĉeĥoslovaka respubliko) por ke ŝi povu konvikigi niajn fakajn rondojn pri la utileco kaj praktikeco de esperanto.

ooo

EL PENSOJ DE TOLSTOJ,

En la taglibro priskribis Tolstoj profundajn impresojn de unu nokto:

»Hieraŭ mi ne dormis preskaŭ la tutan nokton; post la enskribo en la taglibron mi preĝis. Dolĉajn sentojn, per kiuj min la preĝo plenigis, mi ne povas priskribi. Se oni imagas la preĝon kiel peton aŭ dankemon, do mi ne preĝis. Mi deziras ion pli altan kaj pli bonan — sed kion, mi mem ne povas diri, kvankam mi klare

ekkonadis, kion mi deziras. Mi deziras kunflui kun la Estaĵo ĉion feliĉiganta, petante ĝin, ke ĝi pardonu miajn pekojn; sed ne, tion mi ne petis, ĉar mi sentis, ke kiam ĝi donadis al mi la feliĉegan momenton, ke ĝi jam per tio pardonis al mi.

Mi dankis al ĝi, sed ne per la vortoj, eĉ ne per la penso. En unu sento mi kunigis ĉion: la preĝon eĉ la dankemon. La timo malaperis. Nek la Kredon, Esperon kaj Amon mi povis disigi de tiu ĉi sento. Ne tiu sento, kiun mi hieraŭ havis, estas la Amo al Dio — la amo nobla, kuniganta ĉion belan kaj rifuzanta ĉion mahonan. Kiel terure estis por mi observi la tutan bagatelan kaj pekan vivmanieron. Mi ne povis kompreni; kiel ĝi povis ravi min. Kun kia pura koro mi petis Dion, por ke Li akceptu min sur Siajn genuojn. Mi ne sentis la korpon, mi estis —

Sed ne — la bagatela, homa vivo denove korpemis min kaj pasis eĉ ne la tuta horo kaj mi aŭdis hele voĉon de la malpraveco, ambicio kaj de la dezerteco. Mi sciis, de kie sonas la voĉo, mi sciis, ke ĝi pereigas mian feliĉegon, sed en la batalo kun ĝi mi malvenkis.

Mi ekdormis kaj songis pri gloro, pri virinoj, sed mi ne sentas min kulpa. La eterna feliĉego ĉi tie ne estas ebla. La sufero estas neevitebla. Kial? Mi ne scias. Kaj kiel mi povas tion certigi? Mi ne scias. Kiamaniere mi povas pensi, ke estas eble koni la vojojn, de la Providenco? Ĝi estas fonto de la intelekto kaj la intelekto volas ĝin kompreni, sed la sento timas ofendi ĝin. Mi dankas al Li por la momento de la feliĉego, kiu montris al mi la vantecon kaj grandecon mian. Mi volas preĝi, sed mi ne scias. Mi volas esplori, sed mi ne devas, mi fordonas min al via volo!

Pro kio mi tion skribis? Kiel plataj, kiel senenergiaj, certe absurdaj estas miaj sentoj kaj tamen ili estis tiel noblaj!

Tiu ĉi enskribado donas la elokventam ateston pri arda kaj nobla pia sento, kiun estis Lev N. Tolstoj kapabla.

Trad. A. Hejnová.

....

DIVERSAJ SCIIGOJ PRI ESPERANTISTA MOVADO EN RUSUJO.

Ĉe la Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo (S. E. U.) starigita dum la IIIa Tutruslanda Kongreso Esperantista estis fondita lingva komitato, konsistanta el Devjatnin, Dmitriev, Drezin, Fain, Karatov, Modenov, Obruĉev, Ovsjanikov, Romanoviĉ, Rozanov, Ort Sumnam, Šaber, Švarc, Valentinov, Varannin. Esperantista Kooperativo ĉe S. E. U. havas

2,000.000 rbl. da kapitalo. Ĉiu akcio kostas 2000 rublojn.

En Orenburg mortis diligenta esp-ista laboranto Boris Miŝskij, verkinta sub pseudonimo Bela Manto. Mortinta estas ankaŭ unu el la pioniroj de nia movado sur Krim, dro Ostrovskij.

La Estona Esp-o Asocio proponis al la komerca delegitaro sovjet-ruslanda rusajn lernolibrojn de E-o kaj vortarojn (de Dmitriev kaj Medem). La delegitaro promesis aĉeton, se la rusaj esp-istoj oficiale ĝin sciigos pri la bezono. ESI (Esperantista Komunistista Internacio) tion senprokraste faris.

Pri la esperantista movado en cetera mondo estis ĝis nun ĉa rusaj samideanoj malbone informitaj, kiel ni ĝis antaŭ nelonge pri agado de esperantistoj en Ruslando. Maksim Gorkij, kiu daŭre favoras Esperanton, sciigis la samideanojn, ke ankoraŭ aperas Amerika Esp-isto. Gorkij tion eksciis de iu lin vizitinta amerikano.

ooo

EL REDAKCIO.

Tradukantojn ni petas, ke ili laŭeble sendu al ni kun tradukajo ankaŭ originalon (transskribon). Ni ricevas tradukajojn, kiuj estas konvenaj, sed kelkaj frazoj ofte ne estas ĝuste tradukitaj kaj sen originalo ni nur malfacile povas solvi ĝustan senceon de tiaj frazoj.

S-o L. R. en P. Dankon. — Sendu finon, poste ni ion publikigos.

S-o E. B. en R. Ni skribos al Vi leteron.

S-o V. K. en B. Jes. Vi povas al ni afable promesitan sendi — dankon. Baldaŭ Vi ricevos de ni leteron.

F-ino K. H. en P. Ni kore kankas.

BIBLIOGRAFIO

Antaŭ nelonge aperis fino de traduko de romano »Avineto« (**Babiĉka**), kiu estas ĉefa verko de eminenta ĉeĥa verkistino Božena Němcová, kies 60an datrevenon de morto rememorigis al si ĉeĥoslovaka nacio en januaro de tiu ĉi jaro. Malgaja estis ŝia vivo, plena da zorgoj kaj suferoj, sed ŝiaj verkoj havas grandegan gravecon por ĉeĥoslovaka literaturo. Kaj »Avineto« estas en ĝi vera trezoro, kiun ĉiu leginto kun ĝojo memoras kaj ĝin ree kaj ree tralegas. Ĝi priskribas idilian vivon en hejmo de verkistino dum ŝia juneco kun la poezio de malnovaj tradicioj kaj kutimoj. Centro de ĉiuj okazoj estas malnovmoda, de ĉiu amata maljunulino, en kiu estas personigita la animo de ĉeĥa popolo. Traduko de »Avineto« aperadis ĉiujparte antaŭ la mondmilito en gazeto »Časopis Českých Esperantistů«, jarkolektoj 1910—1914. La gazeto komence de la milito malaperis kaj tiel restis la traduko nefinita. Tion multaj esperantistoj bedaŭris kaj pro tio estis nune la fino eldonita aparte kaj estas ricevebla por Kč 2.50. Kiu ne havas koncernajn jarkolektojn de »Časopis Českých Esp.«, povas ilin

ricevi en nia administrarejo, nome jarkolektojn 1910, 1911, 1912, 1913, po 5 Kč kaj jarkolekton 1914 po Kč 2.50. Aĉetanto havigos al si ne nur la tradukon de »Avineto«, sed ankaŭ alian, multenhavan, bonan legaĵon.

Kursa lernolibro laŭ praktika metodo de Dro Edmond Privat, privat-docento ĉe la Geneva Universitato. 4-a eldono. Esperanto-Verlag, Berlin S 59. 80 paĝoj. Prezo 9.— Mk. Tiu ĉi libro estas aranĝita por kursoj de esperanto, estu la lernatoj de kiu ajn nacio, ĉar ĝi estas skribita sole en esp. Ĉiuj 50 lecionoj enhavas multe da konversaciaj frazoj, tiel ke la lernatoj kutimas flue paroli, kvankam ili ne estas devigataj lerni grandan nombron da vortoj, precipe en la komenco. Tre taŭgaj kaj bonstilaj estas kontinuaj artikoloj, kompletigitaj per analizaj demandoj. Al ĉiu kursgvidanto ni povas la lernolibron rekomendi.

Entwicklungsgang der Weltsprache (La evoluo de la mondlingvo) de Dr. Albert Steche. Eldonis E. G. Weinmann en Leipzig. 24 paĝoj 18×25 cm, prezo 5 Mk ekskluzive sendokstoj. — Tiu ĉi germanlingva broŝuro priskribas historion de mondlingva ideo kaj de esperanto de l' komenco ĝis la jaro 1921. La germane parolantaj interesuloj trovos en ĝi ĝustan instruon en ĉiu direkto.

Eldonantojn de libroj kaj gazetoj ni petas, sencu al ni ĉiam po du ekzempleroj de ĉiuj eldonaĵoj.

DIVERSAĴOJ

XVII. ĝenerala kunveno de Esperantista Klubo en Plzeň okazis la 25an de februaro 1922 en restoracio »Svoboda«, Perlová ul. Ĉeestis 60 personoj inter kiuj estis delegitoj de Laboristaj kluboj el Plzeň, Doubravka kaj Letná. Oni elektis sekvantan komitaton: prezidanto so J. Pavlík, vicprezidanto so J. Brožík, sekretario so F. Hříbal, bibliotekisto so A. Loukota, kasistino f-ino Lábková.

Esperantista Klubo »Zamenhof« en Kladno aranĝis la 29. I. 1922 ĝeneralan kunvenon en restoracio »U Jágrů«. Elektitaj estis: Ot. Kočí prezid., A. Brož vicprezid., Fr. Stříbrský sekretario, s-ino Semanová kasistino, K. Hüttner protokolisto. Fr. Čisáň bibliotekisto. Anstataŭantoj: C. Urban, J. Šrámek, J. Martínek, s-ino Lanzdorfová, f-ino A. Kolenatá. Klubo aranĝas multnombre vizitatajn kursojn, unu por komencantoj, alian por progresintoj. Unuan kurson gvidas s-ino Semanová, duan Ot. Kočí. Oni faris grandan propagandon por E-o. En stratoj estis disdonataj flugfolioj »Lernu Esperanton« kaj en kinematografo estis projekciita reklamo pri esp. kurso. Grandega standardo kun surskribo estis etendita trans ĉefa strato kaj ĝi instigis lerni Esperanton. Urba konsilantaro subtenas esperantistan movadon per ĉiujara subvencio de 100 Kč. Kelkaj policanoj lernas Esperanton. Lokaj gazetoj skribas favore pri Esperanto. Ĵurnalo »Svoboda« publikigas ĉiusemajne artikolojn pri Esp-o aŭ tradukojn el esp. gazetoj. Oni povas atendi, ke laboristaro de Kladno elektos Esperanton por interrilatoj kun fremdlandaj laboristoj. La 31. VII. 1921 parolis esperante al grandega amaso da laboristoj redaktoro de »Laborista Esperantisto« el balkono de urbdomo, interpretigante saluton de

francaj laboristaj gimnastikistoj. Klubo havas sian kunvenejon en restoracio »U Jágrů«, Masarykova tř. kaj oni kunvenadas ĉiulunde je la 20. horo.

III. ĝenerala kunveno de Ĉ. A. E. (Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista) okazis la 12. de februaro 1922 en kafejo »Opera« en Praha. Ĉeestis 59 personoj el diversaj urboj. Post raportoj de komitatanoj oni vigle diskutis pri loko de okazonta I. Ĉeĥoslovaka Kongreso Esperantista. Poste oni decidis, ke la kongreso okazos en Brno en tiu ĉi jaro. Daton oni ankoraŭ ne fiksas. En novan komitaton estis elektitaj gesinjoroj: Eiselt, prezidanto; Dr. Kamaryt, vicprezidanto; Hromada, ĝen. sekr.; Günz, H. sekr.; Vlčeková, III. sekr.; Novák, kasisto. Komitatanoj: Pitlík, Šupichová, Sklenčka, Friedrich, Kudela, Gross, Anstataŭantoj: Svačina, Berger, Janalíková, Kejzlarová, Kubala. Kontrolo komisiono: Kraus, Kavan, Popper, Janečka, Stříbrský. Anstataŭantoj: Loveček, Vašíček, Vesela. Alvenis diversaj liberaj proponoj, el kiuj ni citas tiun de s-o Janečka, ke oni elektu jun esp. gazeton, oficiala gazeto de Ĉ. A. E. Post klarigo de s-o Kavan oni tiun proponon malakceptis.

Monata subvencio de 1000 gm de Danziga Senato al Danziga Esperanto-Asocio. Senato de Libera Urbo Danzig, sekcio por eksteraj aferoj, enreg. S. P. 529/22. Danzig, la 3an de februaro 1922. Al Danziga Esperanto-Asocio. Senato decidis hodiaŭ la jenon: »Por finigo de la organizaj antaŭlaboroj estas donata al Danziga Esperanto-Asocio de 1. febr. ĝis fino de l' kongreso monata subvencio de 1000 gm el »Dispositionsfonds«, kiel salajro por sekretario, scipovanta la Esperantan lingvon. Krom tio la centro estis komisiata disponigi skribmaŝinon senpage kaj pruntedone por la sama tempo.« Subskribis: Sahn. — Devo de la Danziganoj estas nun organizi impresigan antaŭkongreson tritagan kaj la plej bona respondo de la tutmonda esperantistaro estu viziti ĝin mulnombre. Detaloj sekvos. — Max Amort, unua sekretario de Danziga Esp. Asocio.

Kolektantoj atentu! Se Vi deziras pligrandigi vian kolekton de P. M., il. P. K., moneroj ktp., aliĝu al internacia klubo de korespondado kaj interŝanĝo »Batavo«, kiu al Vi havigos ĉion, kion Vi bezonas. »Batavo« eldonas oficialan kvaronjaran organon, kiu estas skribita esperante, france kaj germane. Kotizaĵo 30 Kč jare. Direkcio de la klubo en Scheveningen en Nederlando. Skribu al Fr. Bulka, ĉefdelegito de internacia klubo »Batavo« por Ĉeĥoslovakio en Poprad, župa spišská, Slovaĵujo. Enmetu poŝtmarkon por respondo.

IV. internacia foiro en Praha okazos de 12.—19. marto 1922. Foira oficejo troviĝas en Staroměstská radnice, Praha I.

Internacia laborkongreso katolika en Luxembourg. La 31an de julio ĝis 3a de aŭgusto okazos en Luxembourg la 2a internacia laborkongreso katolika. Ĉiulandaj samideanoj katolikaj kore estas invitatataj. Detalaj informoj donos la nacia direktoro de Ika, L. Balák, Husovice ap. Brno, Komenského 17, kaj Centra oficejo de Ika, Graz, Karlmeliterpl., Aŭstrujo.

Atentigo! Nia administracio volonte akceptos donacojn por suferantaj Rusoj kaj publikigos nomojn de donacintojn. Samideanoj, helpu al niaj amikoj en Rusujo! Kolektu monon en societoj kaj ĉie, kie Vi havas okazon! Ni ne estu la lastaj!

KORESPONDADO.

Ĉeĥoslovakio. Branná u Jilemnice. S-o Jul. Bo-
ĉoun, deziras interŝanĝi P. M. Li sendos 20—50
P. M. ĉeĥoslovakajn kontraŭ sama kvanto de
fremdlandaj.

PRESAĴOJ

EN MODERNA ARANĜO
EN ĈIUJ LINGVOJ LI-
VERAS TRE BALDAŬ
LABORISTA PRESEJO, PLZEŇ,
ROŽMBERSKÁ 1.

**Knihy, jež možno obdržeti
v naší administraci**

pouze proti placení předem, na zaslanou slo-
ženku, po objednávce s připočtením porta, ji-
ných knih nevedeme

- B. Tittl: Slovník esperantsko-český,
vázaný Kč 7.50
- Slovník esperantsko-český, brož. Kč 5.—
- Časopis »La Progreso«, roč. 1918 Kč 4.50
- Časopis »La Progreso«, roč. 1919
Nroj. 5—10 Kč 4.—
- Časopis »La Progreso«, roč. 1920 Kč 16.—
- Časopis »La Progreso«, roč. 1921 Kč 20.—
- Tittl: Krátká mluvnice Esp. Kč 0.30
- Čejka-Krumpholz: Malá mluvnice
Esperanta Kč 3.10
- Šupichová: Esperanto. Slovník a
mluvnice, doporučena minister-
stvem vyučování pro kursy a
samouky. Kč 8.80
- Novák: Čeŝa literaturo. Kč 8.—
- Dr. Absolon: Moravia Karsto. Kč 7.50
- Esp. movado en Moravio Kč 4.—
- Kamaryt: Úvahy o jaz. mezinár. Kč 0.80
- Jazyk všeslovanský a Esp. Kč 0.20
- »O dvojí pravdě« Kč 14.—
- por niaj abonantoj Kč 12.—
- Vortoj de Zamenhof, na lepším
papíře Kč 6.—
- Sherlock Holmes Kč 4.50
- Božena Němcová: »Babička«, fino de
traduko »Avimeto« Kč 2.50
- J. S. Machar: Benedek Kč 3.60
- Gvidlibro tra Praha Kč 3.60
- Výtah z Kotzina: Na obranu esper. Kč 2.40
- Co je esperanto Kč —.20
- Kreŝtanov: Bulgara lando kaj Popolo Kč 20.—
- E. Privat: Vivo de Zamenhof Kč 48.—
- Por kongresaj glumarkoj 100 Kč 10.—
- Esper. insignoj »U. E. A.« Kč 8.—
- Esper. insignoj malgrandaj pingloj Kč 4.—
- Esperanta insigno E. broĉoj Kč 5.—
- Esperanta kantar. Tekstaro de diversaj
popol. kantoj Kč 3.—
- muzika eldono Kč 7.—
- La Espero. Himno Esperantista. Poezio
de Zamenhof, muziko de Měníř, por
fortepiano Kč 4.—

Samideanoj el landoj de centra kaj orienta Eŭropo
povas aboni

„Hispana Esperantisto“

ĉe so. F. Šilha, Praha II., 460 u Karlova.
La gazeto estas ilustrata 16 paĝoj, kun riĉa kaj
interesa enhavo ankaŭ pri Ĉeĥoslovakio.
Jara abono 45— Kč.

Kolekto de »La Esperantisto«, N-ro 1.
**ZAMENHOFA KURSO DE
ESPERANTO POR ĈEĤOJ**
ENHAVO:
Antaŭparolo de D-ro L. L. Zamenhof. Gra-
matiko. Fundamenta ekzercaro kun ĉeĥa
traduko. Esperanta-ĉeĥa radikovortaro. Leg-
aĵoj. Anoncoj.
32 dukolone presitaj paĝoj, gazeta formato
(30×21 cm), eldono 20.000 ekzempleroj.
Prezo Kč 1.—.
Ĉeĥeponojo: R. Ĉeĥ, vicdel. de U. E. A.,
Wien IX., D' Orsaygasse 7/23.

**Via horloĝo funkcios
precize** se vi ĝin donos por
rebonigi al



FR. NOVÁK,
horloĝisto en Praha.
Malé nám. 10.

Horloĝoj. - Juveloj. - Esp.
insignoj de esp. klubo en
Praha. - Esp. glumarkoj,
kolekto da 12 div. specoj,
100 pecoj Kč 4.—, aŭfrankite
Kč 5.—, 1000 pec. Kč 35.—,
aŭfrankite Kč 37.50.

LA ESPERANTISTO.
ORGANO DE ESPERANTA
UNIVERSITATO POPOLA
Dediĉata al la interna ideo de l' Esperan-
tismo.
Jara abono: 8— Kč.
Redakce:
WIEN II., POSTAMT 34.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: In. Gross, Plzeň, Houškova ul. 32,
Presis laborista presejo, Plzeň.